# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo majo 2020**


## PLIAJ AGADOJ NULIGITAJ PRO LA KRONVIRUSO

La stato de la esperanta agado plu restas influita de la pandemio de kronviruso Covid-19. Neniu ĉeesta agado okazas plu en Madrido. La sidejo restas fermita kaj sen aktivado. Hispana Esperanto-Federacio kunvokis tie sian Ordinaran Ĝeneralan Kunvenon la 24an de majo, sed antaŭvideble la anoj devos konektiĝi rete por partopreni.

Ankaŭ Universala Esperanto-Asocio anoncis la nuligon de la ĉijara Universala Kongreso en Montrealo (Kanado). Tiu sidejo plu gastigos la Kongreson de 2022, dum en 2021, kiel planite, la UK okazos en Belfasto (Nord-Irlando). UEA anoncis la okazigon de virtuala renkonto dum la datoj en kiuj la Kongreso devus okazi, komence de aŭgusto. Fakte UEA jam organizis la 25an de aprilo pli modestan virtualan renkonton, anstataŭante la tradician Malferman Tagon, kun sufiĉe bona partopreno en la tuta mondo, pere de la retejoj YouTube, Zoom kaj Facebook.

Krome, TEJO anoncis ke la Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos virtuale, kun programeroj similaj al tiuj tradiciaj, sed logike adaptotaj al la nova virtuala maniero. Ankaŭ ILEI anoncis similan proceduron por okazigi sian ĉijaran renkonton.

Ni rekomendas ke vi estu atentaj al la iniciatoj anoncataj en la reto, ĉar oni plu daŭre organizas renkontojn, ĉu lokajn ĉu tute internaciajn. La plej adekvata loko por ekscii pri tiaj renkontoj estas la reto https://eventaservo.org/, kiu estis adaptita por montri ankaŭ virtualajn renkontiĝojn.

## VIRTUALA CELEBRADO DE LA TAGO DE LA LIBRO

En tiu ĉi jaro ne eblis partopreni la tradician legadon de la verko Don Quijote, sed tamen, laŭ iniciato de Hispana Esperanto-Federacio, eblis ĝui la Internacian Tagon de la Libro, en virtuala maniero. HEF rememorigis siajn anojn kaj amikojn je la 23a de aprilo ke en ties retejo troviĝas la plena versio en Esperanto de la verko “La inĝenia hidalgo Don Quijote de La Mancha”, libere alirebla en formato epub: https://www.esperanto.es/hef/index.php/295-don-quijote-en-esperanto, kaj kuraĝigis la legantojn kunhavigi sian sperton, filmante sin dum oni legas pecon de la verko.

Vi povas spekti la rezulton en la jutuba kanalo de HEF: http://www.youtube.es/esesperanto. Tie troviĝas jam du pecoj en la momento de redaktado de tiuj ĉi linioj, kaj pliaj filmoj estas pretigataj. Se vi emas kontribui, ni kuraĝigas ankoraŭ sendi vian kontribuon al la adreso hef@esperanto.es.



## DAŬRIGU VIAN ESPERANTUMADON EN LA RETO

En nia pasinta aprila numero, ni rekomendis diversajn rimedojn por plu resti en kontakto kun Esperanto kaj la esperantista komunumo pere de la reto. Ni rekomendas ke vi plu konsideru ilin kiel bazon. Jen kelkaj aldonoj al tiu listo.

Ni menciis la publikigon en la reto de ĉiuj numeroj de la “Boletín” de HEF (vidu ligilojn ĉe: https://www.esperanto.es/hef/index.php/408). Ni aldonu ankaŭ la disponeblecon de la revuo “Esperanto” de UEA, kiun vi povas legi ĉe https://uea.org/revuoj/esperanto.

Krome, memoru ke ĉiuj numeroj de tiu ĉi bulteno “Nia Voĉo” ekde la jaro 2011 estas legeblaj en la retejo de MEL: http://esperanto.es/mel/index.php/dokumentoj-documentos.

Rilate al libroj, eldonejo Mondial metis je ĉies dispono parton de sia katalogo, inklude de kelkaj Belartaj Rikoltoj, kun la premioj de la Belartaj Konkursoj de UEA; vizitu la paĝon: https://esperantoliteraturo.com/senpage.html. Ankaŭ sonlibrojn oni povas libere aliri, danke al la iniciato de Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen, kunlabore kun Stano Marček, ĉe: http://stano-auskultejo.bplaced.net/.

Kiel ni informis en pasinta numero, TEJO pretigis novajn videojn kun spertoj tutmondaj pri la pandemio. En aprilo oni eldonis du novajn filmojn, kiujn vi povas spekti per la ligiloj en: https://www.tejo.org/esperantistoj-kaj-kronviruso-epizodo-3/..




## POR PLIAJ INFORMOJ

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

## RESTU SANA, RESTU HEJME

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com